

# IPI 35 (4/00)

## Enhavo

|     |   |    |
|-----|---|----|
| 1   | „Linguistic genocide in education“ – librego de Tove Skutnabb-Kangas<br>..... | 2  |
| 1.1 | Recenzo (LIU Haitao).....   | 2  |
| 1.2 | La enhavo-tabelo de la libro .....  | 6  |
| 2   | The Foundation for Endangered Languages .....                                 | 9  |
| 3   | Festlibro omaøe al Marjorie Boulton kaj William Auld .....                    | 10 |
| 4   | Lingvistika prezento: Frank Nuessel, The Esperanto Language.....              | 11 |
| 5   | Pri la nomo de la lingvo de Zamenhof .....                                    | 15 |
| 6   | Terminoteko ne plu ?.....   | 16 |

\*\*\*

*Ipl informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicaåoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo aý kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaý publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn.*

# 1 „Linguistic genocide in education“ - libreto de Tove Skutnabb-Kangas

Aperis vere giganta libro de la konata lingvistino kaj lingvopolitikstino Tove Skutnabb-Kangas, inter kies ĉefaj temoj estas la rilatoj inter homaj rajtoj kaj lingvoj, do lingvaj rajtoj.

Pro la fundamenta graveco de tiu-ĉi libro ni ne nur prezentas, kiel kutime, la enhavolistojn, sed ankaŭ detalan recenzon de la ĉina interlingvisto LIU Haitao.

## 1.1 Recenzo

Skutnabb-Kangas, Tove (2000). *Linguistic genocide in education - or worldwide diversity and human rights?* Mahwah, NJ & London, UK: Lawrence Erlbaum Associates, xxxiii+785 pp. ISBN 0-8058-3468-0.

recenzita de **Liu Haitao**

Salikoko Mufwene komencis sian artikolon pri lingva ekologio jene: "The 1990s will undoubtedly be remembered in the history of linguistics as the period during which awareness of language endangerment and death increased among linguists." (1998). Li pravas. Se ni foliumas la haveblajn verkojn pri la temo, ni rimarkas ke la aŭtoroj venas el diversaj partoj de la terglobo. Tiel ni povas konkludi ke la fenomeno ne plu estas regiona, kaj estas mondvasta. Alidirite, la ekologia vidpunkto, en kiu kerniĝas la diverseco de la lingvo, estas emfazita de diverslandaj lingvistoj. Kvankam mi jam legis kelkajn verkojn pri la temo, kiam la recenzita verko kuŝas antaŭ mi, mi sentas ion pezan. Kun la evoluado de legado, mi forte allogitas de la libreto, kiu certe estas la plej detala, riĉa kaj instiga verko pri diverseco, homrajto kaj ekologio de lingvo.

La aŭtorino kaj ŝia edzo Robert Phillipson ne estas fremdaj al informitaj interlingvistoj, ili ambaŭ estas pioniroj en la tereno. Kelkaj centoj da artikoloj kaj kelkaj libroj jam estas publikitaj de ili. Laŭ mi, la nuna verko estas la plej ampleksa kaj multaflanka el ĉiuj verkitaj de ili.

Mi eltiras el la titolo de la libro sekvajn vortojn: "lingvo, gentomurdo, eduko, mondvasta, diverseco, homrajtoj". Ĉiuj vortoj kaj iliaj sencoj tekstas multadimensie en la ĉeftemon de la libro, la interrilato inter tiuj vortoj (pli precize faktoroj) ne estas simpla, kaj ege kompleksa. La aŭtorino priskribas sian libron per tiaj vortoj "Language are today being killed and linguistic diversity is disappearing at a much faster pace than ever before in human history,

and relatively much faster than biodiversity. The book starts with a short expose of the present 'health' situation of the world's languages and the prospects for them during the next few generations. The conclusion is that the future looks grim - if things continue, we may kill over 90 percent of the world's oral languages in the next 100 years"(p. ix). Ĉu la aŭtorino troigas la funkcion de lingva diverseco en homa socio? Ĉu ni devas kredi la diraĵon alian, ke lingva malapero estas normala etapo en socia evoluado? Ajnaj homoj agnoskas, ke biodiverseco estas unu el la plej esencaj trajtoj de nia planedo, ke la homaro devas pace kunvivi kun sia ĉirkaŭaĵo. Tamen ni ankaŭ facile vidas, ke homoj elstaras inter aliaj animaloj kaj plantoj, ĉar ili havas lingvon kaj kulturon. Ni ne povas imagi la mondon kaj terglobon sen lingvoj kaj kulturoj. Tial, biodiverseco, lingva kaj kultura diversecoj, ĉiuj estas necesaĵoj en la homa socio. En tiu ĉi libro, per grandkvantaj faktoj la aŭtorino pruvas, ke kiam unu diverseco riĉiĝas, alia ankaŭ samas riĉas, inverse la konkludo ankaŭ funkcias. La rilato inter ili estas kaŭza. Se tio estas prava, ni ne plu rajtas ignori la diversecon de lingvo kaj rilatitaj temoj.

Foliumate la libron, en unua vido, vi trovos multajn vortokadrojn kun diversaj grandecoj kaj formatoj. Aspekto, tio verŝajne estas la dua evidenta trajto de la libro, la unua estas ĝia 'dikeco'. Jen kvin formatoj de vortokadroj: Definition, Address, Reader Task, Info kaj Insert. Por multaj legantoj la libro liveras al ili nemalmultajn novajn nociojn, tiel facile estas komprenita la funkcio de 'Definition' kadro, kie la nocio ofte estas kerna kaj devas esti bone memorita. 'Address' alportas al ni modernan etoson, ĉar en la kadro ne nur havas veran helikon, ankaŭ virtualan reton kaj araneaĵon. Tiaj adresoj certe estas tre utilaj al interkomunikado kaj informado pri aktualaj scioj. Por profundigi tekstan komprenon kaj ligi teorion kun praktiko, la taskoj en 'Reader Task' sendube estas helpaj iloj. 'Info' kaj 'Insert' donas al ni kvantan kaj kvalitecan 'datumon', kiu enhavas 'ciferon', 'fakton', 'leĝon' kaj 'personan sperton'. Tiuj ĉi datumoj ludas nemankeblajn rolojn en perfekta komprenado. Resume, la interesaj kadroj helpe komprenigas la enhavon de la libro kaj montras la direkton de sekvaj esploroj.

Denove mi devas mencii la ampleksegecon kaj multaflankecon de la libro, en ĉi mallonga recenzo mi ne kapablas doni al vi pli detalajn prezentojn. La nuna recenzo verŝajne similas al la alvoko 'ĝui la belan floron sur la kuranta ĉevalo'. Se vi povas ligi vin al Interreto, bonvolu viziti la hejmpaĝon de la aŭtorino por detala enhavtabelo:

<http://babel.ruc.dk/~tovesku/newbook.htm>.

La aŭtorino komencas sian libron per malfacile respondita demando 'kio estas lingvo?', kvankam ni klare scias, ke al tia demando ne eblas havi unuecan respondon. La diskuto multaflanka utile profundigas nian konon pri la temo. En la sama ĉapitro multaj faktoj kaj

datumoj estas kunteksitaj por lumigi la nunan staton de lingvoj en nia mondo. Tiaj datumoj ne nur helpas la legantojn precizigi la panoramon de la lingva demando, ili ankaŭ liveras al ni la kvantan fundamenton por diversaj temoj pri la lingvo. Kiel implikita en la titolo, lingva gentomurdo vole nevole tuŝas la demandon, kio estas lingvoj 'minacitaj' kaj 'sekuraj'. Tion la aŭtorino difinas krude jene: ni povas taksu la sekuran staton de iuj lingvoj laŭ 'denaska lernado' kaj 'nombro de uzantoj'.

En la dua ĉapitro, la ligo inter biodiverseco kaj kultura/lingva diverseco estas multe diskutita. La temo indas, ĉar ĝi estas la fundamento de la libro. Interese, multaj materialoj ankaŭ estas utilaj al komprenado de ĝenerala ekologio. Tabelo 2.3 iom klare elmontras la rilaton.

La tria ĉapitro fokusas sin en jenaj temoj: gepatraj lingvoj, kulturo kaj etno. Gepatraj lingvoj estas unu el distingiloj de homaj grupoj. Kiel konate, lingvo ne nur estas ilo de interkomunikado, ĝi ankaŭ estas portanto de kulturo. La malapero de iu lingvo ankaŭ ofte mortigas sian kulturon. Ĝis tie, ni devas turni nin al malnova demando: Ĉu lingva diverseco (multlingvismo) estas 'beno' aŭ 'malbeno' por la homaro? Max Hans-Jürgen Mattusch iam verkis libron kun sama titolo (kp. mian recenzon en IpI 32 [1/2000]). Mi iam diris, ke la demando estas dilemo por ĉiuj sciencistoj, kiu sin engaĝas pri la temaro. La diverseco kreas buntan vivmedion kaj mondon por ni, se ni sentas ke la bunteco estas necesa kaj bela por nia vivo, tiam estas 'beno'. Tamen ni ankaŭ devas klare vidi, ke plurlingvismo malhelpas interlingvan komunikadon, kiu ege severiĝas kun la tutmondiĝo kaj retigo. Mia opinio, ajna studanto pri la temo devas akcepti la defion, t.e konsideri la duflankecon de la problemo. Se vi ne havas racian solvon, kiu sufiĉas al du postuloj, vi ne kapblas efike protekti lingvan ekologion. Fakte, kiam mi legas dokumentojn pri lingva ekologio aŭ ekologia lingvistiko, verkitaj de lingvistoj ekster interlingvistiko, mi forte sentas la necesecon de la solvo. Ili ĉiam diras, ke oni devas savi diversecon de lingvo kaj kulturo, ke la uzado de 'grandaj' lingvoj mortigas 'malgrandajn' lingvojn..., tamen ajnaj homoj rajtas demandi, se mi ne uzas la Anglan kiel interlingvon, ĉu vi havas pli bonan kandidaton? Neniu respondas. Certe, interlingvistoj kapblas respondi tion. Tamen iliaj sonoj estas tro malfortaj en tiu ĉi malracia mondo. Ni ĝojas vidi, ke la aŭtorino de la libro ankaŭ atentis la demandon kaj provas respondi ĝin. Jen, la racia solvo estas 'neŭtrala' planlingvo 'Esperanto'. Ni devas agnoski, ke kvankam por interlingvistoj Esperanto ne estas fremda aĵo, por esploristoj de lingva ekologio tiel pozitiva respondo tamen venas unuan fojon!

Laŭ interlingvista vidpunkto la ĉapitro pri Esperanto estas tro mallonga en tiel ampleksega libro. Tamen tio estas vere bonaga komenco. Jen la aŭtorina takso por Esperanto "Esperanto takes much less time to learn than any 'natural' languages, because it is regular and logical -

there are no exceptions. But still you can say whatever you want in Esperanto, because everyone can easily create new words which are immediately understandable for everybody else once the root is explained - the words are relatively transparent."(p. 280). Kial Esperanto havas avantaĝon kompare al la Angla kiel interlingvo, jen ŝia respondo: "I see Esperanto as a possible viable alternative to today's languages for international communication. A Work Group on language options in the European Union looked at what the options are to solve the language problem in a multinational and multicultural community, using the criteria of (1) equality, (2) cultural and linguistic diversity, (3) non-discrimination, (4) democracy, and (5) efficiency. There is no doubt in my mind that a solution with English does not fulfill any of the criteria. Esperanto does. Esperanto is an additive, not subtractive language. Ignorance and prejudices may prevent useful solutions"(p. 283-284). Belaj respondo kaj takso por Esperanto, tamen certe tio nur estas komenco, longa vojo ankoraŭ kuŝas antaŭ ni.

Lando ludas la gravan rolon en lingva ekologio, ĝia lingva politiko estas unu el tre bazaj faktoroj influantaj la 'sanstaton' de lingva ekologio. Tio la estas ĉeftemo de la kvina ĉapitro.

Tutmondiĝo, posteno kaj regado, ĉiuj kune formads la lingvan ekologion. En la sesa ĉapitro, la aŭtorino eĉ citas la vidpunkton de fama finacisto G. Soros pri krizo de tutmondiga kapitalismo (p. 436-437).

Ni povas vidi, ke lingva diverseco rajtas gravi same kiel biodiverseco, bedaŭrinde ĝi malaperas laŭ rapida ritmo. Kiel oni baras ĝian evoluadon? En moderna mondo, leĝo eble estas la plej efika rimedo por bari la krimon. Tiel komprenite, la aŭtorino dediĉas la lastajn ĉapitrojn al la temo: Lingva homrajto, multlingvisma eduko. Same kiel en aliaj partoj, la aŭtorino donas al ni multajn datumojn kaj faktojn pri homrajtoj ĝenerale, kaj lingvaj homrajtoj speciale. Rimarkindas, ke lingva homrajto havas tre malaltan lokon en la tereno. Precipe, la landoj, kiuj parolas iujn 'grandajn' lingvojn, serioze ignoras la staton de lingva homrajto. Se ni agnoskas, ke lingva homrajto estas grava parto en tuta homrajto, ĝi same ankaŭ devas esti sekvata. Tamen la homrajta problemo eble estas pli kompleksa ol lingva problemo. Se oni malatentas la leĝan solvon de lingva ekologio, ĉu ni ankoraŭ povas vidi la brilan futuron de lingva ekologio, mi dubas pri tio.

La multaflankecon de la libro montras ne nur ĝia enhavo. Inter la celataj legantoj, eble por protekti la ekologian sanstaton, politikistoj estas pli gravaj ol lingvistoj. Indas vastigi la legantaron de la libro, ja ajnaj homoj interesiĝas pri la estoneco de homaro. Ili kun profito legos la instigan libregon. Ĉiuokaze, la recenzita libro por la homaro gravas ne nur kiel pura lingvistika verko.

En la fino de la libro ni trovas bibliografion sur 70 paĝoj. Estas interese, ke ankaŭ ekzistas

mallonga bibliografio pri interlingvistiko kaj Esperanto, preparita de Mark Fettes. Kompletaj indeksoj de nomoj kaj nocioj helpas trovi bezonitajn aĵojn en la granda libro.

Denove ni reiras al la ampleksegeco de la libro. Ni devas agnoski, ke la libra strukturo estas racia. Tamen, mi ankoraŭ havas iom miksitan senton. Se la aŭtorino povus forstreki la enhavon pri ĝeneralaj temoj kiel ekologio kaj homaj rajtoj la libro estus pli fokusita al la ĉeftemo kaj pli malmultekosta. Tia mallongigo estus utila al la lingvistika leganto, ĉu ankaŭ utila al politikisto kaj edukisto, mi ne kapablas respondi. Persone mi preferas tian enciklopedian libregon, ĉar en Ĉinio mi malfacile trovas la materialojn menciitajn en la libro.

LIU Haitao , [htliu@iname.com](mailto:htliu@iname.com)

## **1.2 La enhavo-tabelo de la libro**







## **2 The Foundation for Endangered Languages**

Rekte ligita al la supre prezentita libro estas “The Foundation for Endangered Languages” FEL. Øi havas jenen retpaŝon: <http://www.bris.ac.uk/Depts/Philosophy/CTLL/FEL/>  
Germana sekcio troveblas æe <http://www.uni-koeln.de/gbs/> .

La programon indikas la nomo de FEL. Øi informas pri siaj celoj, konferencoj, eldonas informbultenon, kolektas materialon, de kio multo ankaŭ eniris la supre

prezentitan libron.

### **3 Festlibro omaøe al Marjorie Boulton kaj William Auld**

Jen aperis libro okaze de la 75-jariøoj de du el la æefaj kreantoj de la esperanta literaturo: Marjorie Boulton (\* 7.5.1924) kaj William Auld (\* 6.9.1924).

*Benczik, Vilmos (1999, Red.): Lingva Arto. Jubilea libro omaøe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 217 p., ISBN 92-9017-064-6*

## **4      Lingvistika prezento: Frank Nuessel, The Esperanto Language**

Nuessel, Frank (2000): The Esperanto Language. New York – Ottawa – Toronto:  
Legas,  
153 p. ISBN 0-921252-95-1







## 5 Pri la nomo de la lingvo de Zamenhof

Fojfoje en la medio ĉirkaŭ AIS oni honteme evitas la oficialan lingvo-nomon „Esperanto“ kaj nomas la lingvon, ankaŭ en nacilingvaj tekstoj (kaj tio estas ĝena), „La Internacia Lingvo“ (foje amuze aldonas: „de Doktoro Esperanto“) aŭ, pli ofte, Ilo. Tio povas esti konfuza por neinformitoj. Mi detale analizis la demandon siatempe en „der esperantist“ (n-ro 139 [5/1986]). Jen plia esprimo pri la temo de grupo, kies fakulan statuson mi tamen ne kapablas prijuĝi.

D. Blanke

## 6 Terminoteko ne plu ?

Kiel ni jam informis antaŭ iom da tempo en lpl n-ro 17 (2/1996) *Bernhard Pabst* eldonis cirkuleron pri terminologiaj problemoj, kiun li nomis „Terminoteko“.

Øi aperis de 1991 – 1996 en 14 kajeroj. Sed en presita formo aperis nur 12 kajeroj (1991-1995), kiuj ankaŭ troviĝas sur la kompaktdisko „espRom“. (Pri la tuta enhavo de tiu kompaktdisko, eldonita de Germana Esperanto-Asocio, kp. „Esperanto aktuell“ 7/1997). Bedaŭrinde Terminoteko ne plu aperas, kvankam la neceso havi iun tian cirkuleron estas pli granda ol iam ajn antaŭe. Eble iu daŭrigos ? La kajeroj 13 kaj 14 neniam aperis surpapere, sed ekzistas en elektronika formo. Pri la æefa enhavo de tiuj kajeroj:

### n-ro 13:

- Martin Haase pri la sinteno de Germana Esperanto-Instituto al terminologia laboro
- Ingward Ullrich pri la principoj de la termino-elekto en Esperanto:\_ la ekzemplo de la forstista vortaro
- Bernhard Pabst pri la revizio de PIV – laŭ kiuj principoj ? (pri juraj terminoj)
- prezento de novaj terminaroj: forstista, genetika, geografia, jura, komputora, muzika, muzikila...
- diversaj prilingvaj diskutoj
- raportoj
- laŭpersona indekso de Terminoteko, kajeroj 1 – 11
- laŭtema indekso de Terminoteko, kajeroj 1-11

### n-ro 14:

- Heinz Hoffmann pri terminologia laboro de IFEF
- reagoj pri la reviziado de PIV
- Claus J. Günkel pri tradukproblemoj kaj decido-mekanismoj æe la reviziado de kulinaraj terminoj en PIV
- diskuto pri botanikaj terminoj
- botanika indekso

La materialo estas daŭre interesa kaj konsultinda.

Interesatoj sin turnu al:

Bernhard Pabst  
Hülscheider Str. 4,  
DE-53 773 Hennef,



Fakso: 00-49-2241-9342207

[PABST@hvb.g.de](mailto:PABST@hvb.g.de)

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Red.: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633, fakso: ++ 49-30-54 56 742.**

**< blanke.gil@snafu.de > Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, se eble per retpoŝto aŭ sur disko. Artikoloj sen indiko pri aŭtoro estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Estas bibliografiitaj nur posedataj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.**

---